

SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio «Languedoc - Roussillon»

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN (Pyrénées-Orientales)

JARA ABONO : 5 F.

C. C. P. 956-28 Montpellier

3-a Kvaronjaro 1975

N° 56



UNION FRANÇAISE POUR L'ESPERANTO

68^a NACIA KONGRESO DE ESPERANTO

LA GRANDE-MOTTE (Hérault)

PASKO 1976 ★ 17-20 APRILO

Jen, mi supozas, agrabla novaĵo por la esperantistoj de Langvedoko-Rusiljono.

Venontan jaron ili povos partopreni nacian Kongreson sen perdo da tempo kaj da mono en longa veturado, fakte la Montpeliera grupo kun la helpo de sinjorino Humm el Avignon kaj la Vauklusaj esperantistoj proponis la Nacian Kongreson en la urbo La-Grande-Motte, dum Pasko 1976 (17 - 20 aprilo).

Alia agrabla sciigo : ni loĝos en V.V.F. laŭ tre interesaj kondiĉoj malgraŭ tre komfortaj dormoĉambroj.

Vi legos pliajn informojn baldaŭ en la bulteno Franca Esperantisto.

J U D A T R A N S P O R T O

(Vidu la unuan parton en la 55a n-ro de SFS)

La dimanĉon 7an de januaro kvin luksaj aŭtobusoj sin ordigis sur la alvokoplacon. Niaj 200 malsanuloj kaj muzulmanoj estis ene instalitaj, ĉiu en unu fotelo, kaj la karavano ekveturis norden. Mi akompanis la transporton kun la SDG.

Por la unua fojo de tre longa tempo mi veturis en komfortaj kondiĉoj kaj kontaktiĝis kun vivo libera kaj civilizita.

Tra la fenestroj mi vidis la kampojn etendiĝantajn ĉiuflanke de la vojo ĝis nevidebleco, mi rimarkis kamplaborulojn kaj militkaptitojn irantajn lantpaŝe sur la plugaj kampoj. Ni renkontis militajn transportojn, ni traveturis vilaĝojn kie buboj ludis sur publikaj placoj. El ĉio tio eliĝis ebriiga liberparfumo.

Bedaŭrinde mi ne havis multe da tempo por ĝui tiun spektaklon, ĉar mi senĉese estis distrita el ĝi de muzulmano sidanta apud mi. Estis judo, ĉirkaŭ tridek jara, kiu tute evidente estis mortigonta. La korpo kunpremita el la fotelo, la busto antaŭe klinita, la kapo falinta sur la bruston, la vizaĝo kvazaŭ freneza, la okuloj fiksitaj, la dilatiĝintaj pupiloj, la lantaj kaj solenaj gestoj, ĉio en li kunigis la baldaŭan morton al la specialisto de tiu speco de tragedio kiu mi estis fariĝinta. Li tenis enmane panpecon kaj lante maĉis kiel aŭtomato ĉiam la saman buŝprenon, kiun li neniam englutis. La pano iafoje eskapis el liaj manoj kaj teren ruliĝis. Li tiam sin antaŭen klinis kaj liaj blindaj manoj serĉis inter liaj kruroj la perditan trezoron. Li fine ĝin trovis kaj sin rerekstiĝis, tamen iom pli kunpremita, tenanta inter siaj krispiĝintaj fingroj tiun makulitan panpecon, por kiun manĝi li jam ne plu havis sufiĉe da forto. Ĉiumomente falis la pano, ĉiumomente tiu mortigonto obstinis ĝin rekapti.

Neniam, kiel tiun tagon, mi sentis je kia grado nia vivo dependas de la pano.

Ni veturis jam de duonhoru kiam vojflanke ni ekvidis senfinajn pikdratajn ĉirkaŭbarilojn, entenantaj gvatturojn kaj individuajn betonŝirmejojn por la gardostarantoj. Pli malproksime estis distingeblaj vicoj da barakaroj.

Ni estis alvenintaj en Salzgitter-Wattenstedt, kampo situanta je 20 kilometroj de Braŭnschweig, en kiu estis enfermitaj la sklavoj de Göring.

Ni devis tie lasi la malsanulojn. Oni atendis ilin en la kampmalsanulejo troviĝanta en vastaj kaj belaj ĉambroj, kiuj rilatis al nia Braŭnschweiga porkejo, kiel kastelo al cigana loĝveturilo. La mastro de tiu kastelo estis pola kuracisto, pri kiu mi nenion iam sciis, krom lia antaŭnomo: Moritz.

Dum oni malsarĝis mian transporton, mi aŭdacis ĉirkaŭiri la najbarajn barakarojn. Mi estis sur ia vasta senarba altebenaĵo ventbalaita, el kiu oni ĝuis larĝspacan perspektivon.

Mi ne havis tempon por plene ĝui la ebriigon de la vento sur tiu vasta ebenaĵo: la malsarĝo estis finita, necesis reveturi al nia haladaloĝejaĉo.


Moritz min informis, ke jam estis unu mortinto inter la alvenintoj kaj ke mi devas lin realporti al Braŭnschweig. Mi iris lin rericivi.

Estis la judo kun la panpeco.

K R U C V O R T O J

Horizontale *

- 1- Plifortigi - Prepozicio
- 2- Granda afrika birdo - Genro de mevo
- 3- Tertranĉilo (R) - Difinita parto de spaco (R)
- 4- Maldekka plato el metalo (R) Malĉefa planedo
- 5- Sufikso - Franca provinco - Inverse: pers. pron.
- 6- Eligi laŭtajn ekrajn voĉsonojn -
Maldekata tolaĵo
- 7- Rapide senpere pasi de unu afero al alia -
konjunkcio - Precize difinita tempo (R).
- 8- Naski antaŭtempe - Moviĝi per la piedoj,
flugiloj aŭ naĝiloj.
- 9- Vantroforma ujo (R)
- 10- Rilata al fabela estaĵo - Oleodukto
- 11- Skrapiloj - Inverse nedifinita pronomo
- 12- Longaj paroloj faritaj de unu persono -
Inverse: artikolo.




R. Raymond (1975)

Vertikale *

- 1- Avanta grandan enhavon - Tre konata (R)
- 2- En malplaza maniero
- 3- Afektanta ekstremen hontemon pri sekaferoj (R) - Laborilo - Fonetike: kontrakto
cele al ricevado de gazeto dum difinita tempo
- 4- Malinsulo (R) - Mezurunuoj - Nomo de litero
- 5- Sankta birdo - Participa sufikso - Varsovia estastia (R)
- 6- Kulturo (R) - Sankta birdo
- 7- Nedifinita pronomo - Unu el la kvar elementoj distingitaj de la antikvaĵoj
subtrahi objekton per alia submetila (R)
- 8- Sakstrato
- 9- Sufikso - Genro de gramenaco (R) - Longa ŝtala stango (R)
- 10- Ne la sama (R) - Poemeto
- 11- Temanta pri amo - Posesiva adjektivo.
- 12- Tirmaĵino

* - (R) nur radikoj


* - Solvo de la antaŭa problemo




Solvo
de la krucvortoj
apevinta sur la 1955

(Geoffroy King)

5 minutoj da intervalo



Sajnas al mi ke nuntempe la polucio plimultiĝas...




Li diris, ke li intencas fari saman metion kiel sia patro.



Patrino, ĉu mi povas meti vian pelton hodiaŭ ?



Karulo, ĉu ĝenas al vi la lumo ?



Morgaŭ vi faros tiel, sen la magneto malantaŭen !



FABELO 1975

- Atentu malbonajn renkontojn, Ruĝaĉapelulino !
- Restu trankvila, patrino, mi komprenis pilolon.

R. Fruŝ

Kelkliniaj kopenhagaj impresoj

Post la hamburga kongreso, la 24. 9. 74, en n-ro 52 de S. F. S., konklude de kelkaj komentoj pri tiu kongreso, mi skribis: Ni atendu kaj observu.

Partopreninte la kopenhagan kongreson, mi hodiaŭ povas el tiu unujara atendo kaj observo, eltiri la sekvantajn konsiderojn.

La ombro de Lapenna etendiĝis sur la tuta 60-a kongreso. Sed ĉu povus esti alie?


La ĉefa fakto estas, ke tiu ombro tute ne malhelpis bonordan, regulan kaj fruktodonan disvolvigon de ĉiuj kongresarangoj senescepte.

Kaj tion UEA ŝuldas al sia nova prezidanto: Tonkin. Tiu juna homo, perfekta oratoro, dinamika preleganto, atentema aŭskultanto, sin kondukis dum la tuta semajno de la kongreslaboroj tiel lerte, inteligente kaj sperte, ke fojfoje la ĉeestantoj ne plu konsciis, ke Lapenna estas for.

Jes, UEA povas fieri pri sia prezidanto, kaj lin tute fidi.

Danke al li la jubilea UEA-kongreso estis plensukcesa, profitdona kaj promesplena por la estonteco de nia universala asocio.

D-ro Georges Salan



VIVO DE LA GRUPOJ



La Federacio "Gard" elektis Uzès por sia jara ekskurso. Ĝi okazis dimanĉon la 21an de septembro 1975a. Partoprenis ĝin gesamideanoj el Nîmes, Alès, Sanilha, Cendras, Saint Laurent la Vernède, Avignon kaj ankaŭ Montpellier. Ni devas menciigi la ĉeeston de fraŭlino Maria Frus el Torino, fratino de nia amiko Roberto; krome estis sinjorino Rose el Moulin, ges-roj Benoit el Arcachon, ĉi lastaj estas nove alvenintaj en nia departemento kaj ni kore bonvenigas ilin.

Antaŭ la tagmezo nia grupo longe vizitis la "Muzeon de Rodo", ĝi entenis 400 metra miniaturan fervojan reton, multege da miniaturoj modeloj de ĉiaspecaj trajnoj kaj pli ol 40 malnovajn aŭtomobilojn.

Ni planis pikniki ĉe la urba kampadejo, sed s-ro Dalgon, abelbredisto, afable invitis la tutan grupon iri al sia hejmo gustumi medon, tial ni veturis al Saint Laurent la Vernède, kaj decidis pikniki sub la ombro de fig- aŭ jugland-arboj. Domage por la montpelieraĵoj kiuj alvenis malfrue kaj neniun trovis ĉe la kampadejo en Uzès, ni renkontis ilin posttagmeze kiam ni vizitis la faman dukejon kune.

Entute ĝi estis agrabla tago, sed la tempo tro rapide forpasis kaj ni disigiĝis ĉirkaŭ la 17a horo.

Ĝis venonta renkontiĝo.

René Raynaud

En la dua kvaronjaro, ni ĝoje ricevis la viziton de fraŭlino Maria Frus, fratino de Roberto, kiu partoprenis nian aprilan kunvenon. Fraŭlino Frus estis unue oficistino ĉe Itala Esperanto-Federacio dum ĉirkaŭ ses jaroj, poste ŝi iĝis oficistino ĉe la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam, tie ŝi ĉefe plenumis kompostadlaboron, ŝi rakontis al ni pri tiu unika viveksperimento kaj volonte respondis al starigitaj demandoj. Tio fariĝis agrabla kunveno.

Alia tre interesa vizito estis tiu de argentina paro: temis pri d-ro kaj d-rino Casartelli, ili anticipe skribis al ni por anonci, ke ili vizitos Nimes la 21an de majo, ili partoprenis grupan organizitan vojaĝon tra Eŭropo.

Laŭ la ricevita informo ni zorgis por okazigi nian monatan kunvenon precize en tiu tago de ilia alveno, ni iris al sia hotelo. Kompreneble ni multe demandis al ili pri Argentino kaj pri ties Esperanto-movado. Post la kunveno ni veturigis ilin tra la urbo por montri la ĉefajn monumentojn. El la tuta argentina grupo nur ili havis la ŝancon ekvidi la historiajn monumentojn de nia urbo, simple ĉar por la cetero detala vizito en Nimes ne estis antaŭplanita ĉar oni juĝis ĝin iom supraĵa. Ili havis do kialon por propagandi Esperanton inter siaj kunvojaĝantoj dum la tuta vojaĝo. En pluraj urboj, same kiel en Nimes, ili renkontis gesamideaĵojn al kiuj ili estis pli frue skribintaj. La fakto mem, ke en tiom da urboj ili trovis kontakton kun geamikoj tiel facile, sufiĉe mirigis iliajn kunvojaĝantojn kaj el tio ili almenaŭ povis konstati la utilecon de Esperanto.

S I N J O R O Raynaud akcidentita

Antaŭ kelkaj semajnoj, ni eksciis la akcidenton pro elektrokuto kiu malbonsance trafis nian amikon René Raynaud. Liaj manoj estis brulvunditaj kaj liaj okuloj perdis la povon kunigi la bildojn de la objektoj, kiuj fariĝis duoblaj al li. Tio fariĝis sufiĉe ĝena, ĉar en la nuna momento li tre malfacile sukcesas legi kaj skribi. Liaj manoj nun resaniĝis, sed en sia lasta letero li skribis, ke li ne jam reakiris korektan vidkapablon.

Ni estas tre ĉagrenitaj pro tiu malfeliĉa okazintaĵo, kaj deziras al li plenan resaniĝon.

